



### **Numero 2024:25; junio 25.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: Lingva diskriminacio de HT: 98 KB  
Rifuĝintoj 95 KB. Sume 480 KB

### **Nova afrika revuo lanĉita**

Mi invitas vin konatiĝi kun la provnumero de la novnaskita revuo *Afrika Esperantisto!*  
Enhave:

- p.1. Vortoj de la redakcio
- p 1. 109-a UK: senpaga veturigo por la anoj de la 57-a ILEI-kongreso.
- p.2. Togolanda aktiveco kun bona humuro
- p.2. La gajnintoj de la konkurso *Partoprenu IJK-n 2024*
- p.3. Intervjuo kun esperantisto Apelete, ano de la Evea Akademio
- p.4. Grimpu Kilimanĝaron kun esperantistoj...
- p.5. Benina junularo renkontas nian lingvon
- p.5. Alvoko por subteni projektojn de afrikaj esperantistoj
- p.6. Neforgesebla ekskurstago en la perlo de Kloto
- p.7. Esperanto en la 3-a Arta Salono de Lomeo en Togolando
- p.8. Ĉu nur ĝirafoj, leonoj...kadre de la 109-a UK en Aruŝo?
- p.8. Reaktiviĝis la madagaskara landa asocio
- p.8. Tanzanio funebras

Bv. elŝuti [Afrika Esperantisto n-ro 00](#), kaj senmodere konigi pri ĝi en viaj rondoj.

Adje Adjévi

### **Litova eminentulo alektita al la Eŭropa Parlamento**

Membro de la Honora Patrona Komitato de UEA Vytenis Andriukataitis de Litovio estis elektita al Eŭropa parlamento. Li estas de la litova socialdemokrata partio. Pri li legu ĉi-tie:

<https://sezonoj.ru/2020/02/litovio-38/> (fine de la artikolo estas ligoj al pliaj artikoloj).

Vidu ankaŭ: <https://sezonoj.ru/2015/02/litovio-7/>

Povilas Jegerovas

### **Charters en Ĉinio raportita en renoma bulteno**

Jen artikolo pro la vizito de Duncan Charters al Zaozhuang en la bulteno de la Federacio de la Profesoroj de Vivantaj Lingvoj (FILPV), kun kiu ILEI havas rilatojn jam tra tridek jaroj.

[Yahoo Mail: cerca, organizza, prendi il controllo della tua casella di posta](#)

Pli bone: <https://fiplv.com/wp-content/uploads/2024/06/fipltv-newsletter-april-2024.pdf>

Alessandra Madella/Didier Janot

## Kursoj aziaj kaj afrikaj

Post la lasta 7-a azia kurso mi komencas pensi pri la 8-a, kiu povus komenciĝi en la venonta septembro. Mi bezonas azianojn, kiuj parolas Esperanton malbone, bone parolantaj aziaj esperantistoj bonvolu ne aliĝi. Se vi konas taŭgajn lernantojn, bonvolu instigi ilin, skribi al [kursaro.sekelj@gmx.com](mailto:kursaro.sekelj@gmx.com).

Post provoj gvidi novan kurson B2 por afrikanoj, ni devis konstati ke *Zoom* estas teĥniko ankoraŭ malfacile uzebla en Afriko (**SMG**: ĉu efektive?) kaj ni devis komenci provi uzi vacapon, kiu estas tre malpli taŭga por akiri parolan kapablon, sed tamen pli facile uzebla. Aliflanke tio havas la avantaĝon, ke nun mi devas afiŝi ie en la reto la lecionojn kaj la aliajn lernomaterialojn. Do ĉiuj povas partopreni la provon fiksi esperantajn tradukojn de afrikaj konceptoj. Por legi resumon, rigardu en [https://uea.org/vikio/Kategorio:Kurso\\_pri\\_Esperanto\\_kaj\\_Afrika\\_Kulturo\\_en\\_Esperanto\\_-\\_nivele\\_B1-B2](https://uea.org/vikio/Kategorio:Kurso_pri_Esperanto_kaj_Afrika_Kulturo_en_Esperanto_-_nivele_B1-B2) kaj la akceptatan rakonton pri *Fumo Liongo*, la mita iniciatinto de la ŝahila poezio. Kiu volas aliĝi al la kurso bonvolu skribi al [UEC-fakultato-pri-lingvoj@groups.io](mailto:UEC-fakultato-pri-lingvoj@groups.io).

Renato Corsetti

## Afrika retradio

La elsendo de la 12-a de junio 2024 de la afrika retradio enhavis la sekvon.

- Malkovro de la kantistino Ankie Van Der Meer el Nederlando (el grupo *Kajto*).
- Vojaĝi senpage de la flughaveno Kilimanĝaro al la kongresa urbo.
- Novaĵo pri kursgvido en Tanzanio

#UEA #esperanroplus #universalakongreso #esperantoenafriko #afrikaretradio  
<https://www.facebook.com/share/p/v31196XCojNd4p9P/?mibextid=xfxF2j>

Koffitche Koufionou

## Diskuteroj por la Komitato de UEA

Prepare al nia kunsido okazonta la 13-an de julio 2024, mi informas, ke du dokumentoj estis alŝutitaj en la komitatan teknon (<https://uea.org/teko/komitato>):

[Por 2024] [Rekomendoj el la komitataj forumoj - Torino 2023](#)

[Por 2024] [Raporto de la Elekta Komisiono al la Komitato de UEA junio 2024](#)

(**SMG**: Hodiaŭ (jun. 19) la spezkonto kaj bilanco por 2023 estas aldonitaj al la TEKO kaj krome aperis en la aŭgusta revuo *Esperanto*.

Koran dankon al la Elekta Komisiono pro la verkado de sia junia raporto kaj al Duncan Charters pro pretigado de la raporto pri rezultoj kun rekomendoj el la kvar komitataj forumoj okazintaj en Torino, kun helpo de Aurora Bute por tiuj rilataj al Instruado, kaj de Lu Wunsch-Rolshoven por tiuj rilataj al Informado.

Aleks Kadar, Ĝenerala Sekretario de UEA.

## Nova libro-eldono en Hungario

Kiel donacon por la *Semajno de la Libro* akceptu la ĵus aperintan, Esperantan tradukon de la libro *Ŝercoj de reĝo Matiaso* kompilita de Ernő Szép kun la ilustraĵoj de Sándor Kolozsvári. La libro elŝuteblas en PDF-formo ĉe la sekva ligo:

<http://verkoj.com/tradukistoj/jozefo-horvath/>

Jozefo Horvath, [www.vortaro.hu](http://www.vortaro.hu)

## Pakistana progreso

En decembro 2023 okazis la 46-a Jara Kongreso de Esperanto en Lahore. Profesoro Francesco Maurelli el Italio estis la ĉefa gasto. Aliaj samideanoj de Lahore, Faisal Abad kaj Multan urboj partoprenis. Oni bonvenigis ĉiun en *Pak Tea House* kaj aranĝis budon de Esperantaj publikaĵoj kaj afiŝoj. Poste okazis lokaj raportoj kaj administraĵoj de PakEsA. Oni decidis planon por 2024 kaj faris videojn pri la Zamenhofa Tago 2023.

Okazis informa seminario en la fama *Unique Akademio*. Ĉefgasta Prof. Francesco Maurelli kune kun estraranoj de PakEsA prelegis pri la graveco de Esperanto en Pakistano kaj en la mondo. Oni legis salutajn mesaĝojn pri nia okazaĵo senditajn de Duncan Charters, prezidanto de UEA kaj Renato Corsetti kaj dankis ilin pro tiuj mesaĝoj. Post la Seminario la Akademio gastigis ĉiujn per teo kaj kuko memore kaj nome de la Zamenhofa Tago pri lia datreveno en 2023.

En la jaro 2024 okazos kvar estrarkunsidoj en la urboj Multan, Lahore, Murree kaj Zamenhof-feste refoje en Multan. Oni planis aliajn aferojn por la movada disvastigo nialande.

Shabbir Ahmad Sial, Prezidanto de PakEsA

## Filmo pri Irlando

<https://drive.google.com/file/d/1fnr1BhcQJeqJShtl6zGYBuHNdizJBFmz/view>

Belega filmeto kun anglalingva komentario kaj subtitoloj en la irlanda gaela.

## Tri eroj en facila Esperanto

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/pri-la-milito-en-la-orienta-parto-de-kongo-r431/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/bela-sperto-en-strasburgo-r432/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/biciklu-esperante-r434/>

## Survoje al inda laborplano

Renato Corsetti aperigis en *La Ondo de Esperanto* artikolon 'Labor-plano, planoj kaj laboroj', en kiu li prezentas siajn ideojn responde kaj kompletige al la unupaĝa malneto de la laborplano de UEA, verkita de la prezidanto de UEA Duncan Charters. Legu kaj komentu (necesas registriĝi) la artikolon de Corsetti ĉe

<https://sezonoj.ru/2024/06/corsetti-4/>

## Ĉinaj studentoj vizitis la plaĝon!

Jadina el la lernejo Baiyangshujie parolas pri sia sperto en la Esperanta Plaĝo de Dennis Keefe. Jen filmo kun longo de tri minutoj kaj 28 sekundoj.

[https://youtu.be/2gY2L\\_3AM8Y?si=soroNIhDUpmGOqjE](https://youtu.be/2gY2L_3AM8Y?si=soroNIhDUpmGOqjE)

Sendis: Alessandra Madella

## Kursoj hispana kaj franca

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: UNED (Nacia Universitato por Ne-ĉeesta Edukado)  
Gvidantonomo: Luis Eduardo Berdor Remón (Aldoninto: Dr Thewolikan)  
Tipo: Nova universitata kurso; Loko: Madrido, Hispanio.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27642>

Nomo: Mezlernejo Louis Pasteur  
Gvidantonomo: Géraldine Dupont, Aldoninto: Aliomo  
Tipo: Nova lerneja kurso; Loko: Arbois, Francio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27643>

## Lingva diskriminacio ekzamenata ĉe UN

En ĉi tiuj tagoj niaj reprezentantoj ĉe UN aranĝis grandegan kunvenon pri lingvaj problemoj kaj lingva diskriminacio je tre alta nivelo. Por kontribui al tiu laboro iom pli modeste je nia nivelo, bonvolu traduki al via lingvo la aldonitan tekston uzotan por informi komunikistojn pri tio, kiu estas nia starpunkto pri la pozicio de nia movado pri lingva diskriminacio. Versioj ekzistas nur en Esperanto, la angla, la germana, la hispana kaj la itala. Trovu ĝin alkröĉe.

## La Tago de Rifuĝintoj

### 1,5% de la monda enloĝantaro estas nun perforte dislokitaj

Persistaj konfliktoj en diversaj mondopartoj altigis la nombron de homoj perforte dislokitaj el siaj hejmoj en la jaro 2023 al pli ol 117 milionoj – rekorde alta nombro de 1,5 procentoj de la monda enloĝantaro, laŭ la ĉiujara pritakso de la Alta Komisiono de UN por Rifuĝintoj. La sumoj de dislokitoj daŭre kreskas en la jaro 2024 kaj verŝajne superas 120 milionojn, laŭ atentigoj de la koncerna instanco. “Malantaŭ tiuj konsternaj kaj kreskantaj ciferoj kuŝas sennombraj homaj tragedioj. Tia suferego devas sproni la internacian komunumon, ke ĝi urĝe agu por fronti la fundamentajn kaŭzojn de perforta dislokado,” asertis la estro de la koncerna agentejo, Filippo Grandi. La deklaro de UEA por la tago estas alkröĉita.

===== vortoj: 1150 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.  
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.